

Karaj geamikoj,

Dudek jarojn post la internacia jaro pri paco, la ligkomitato de NRO/UNESKO enskribis en sian agendon, cele al solenado de la internacia tago pri paco 2020, **“festivalon por la paco”** proponitan de grupo da NROj partneraj de UNESKO.

La celo estas instigi korusojn el la tuta mondo partopreni per kantado por la paco, elektante el repertuaro aŭ kreante novajn kantojn.

Por prepari tiun ĉi internacian tagon por la paco, en septembro 2020, ni laboras por ke centoj da korusoj celebru ĝin kantante por la paco, registriĝu filmeton kaj spektiĝu en sia loko; la kantoj de ĉiuj partoprenintaj korusoj estos disponigitaj al ĉiuj per aŭdvidea rimedo.

**La 19an de septembro 2020 en Toloso, provinco de Gipusko en Hispanio**, laŭ invito de TOPIC (CIT) — membro de la “Internacia Korusa Federacio” kaj de *Europa Cantat*, estos organizita internacia festivalo, gravega evento kun partopreno de multaj aktivuloj por la paco, de la junularo kaj la surloka loĝantaro.

Dum tiu ĉi festivalo, filmitaj kantaĵoj estos enretigitaj kaj publike projekciataj.

Ĉi-aldone troviĝas la informilo kaj la aliĝilo prilaboritaj de la laborgrupo. Tiuj ĉi dokumentoj, tradukitaj en pluraj lingvoj, estas je via dispono.

Ni ĝojas, ke ĝis hodiaŭ registriĝis 19 aliĝoj el 17 landoj, dum **la aliĝperiodo daŭros ĝis la 31a de januaro 2020.**

Esperante, ke vi partoprenos en tiu ĉi ĉefa evento, kaj certigante pri nia volo organizi kun niaj amikoj de TOPIC ampleksan aranĝon por la paco de la popoloj en la mondo, amike salutas

La 24an de novembro 2020

Michel Thouzeau

michel.thouzeau@gmail.com



Laŭ propono de grupo da NROj, oficialaj partneroj de UNESKO

Celebrado de la INTERNACIA TAGO PRI PACO 2020

## Festivalo por la paco

Memorigante la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj, interalie la celojn kaj principojn tie vortigitajn kaj aparte la firman volon antaŭŝirmi la estontajn generaciojn kontraŭ plaga milito,

Memorigante ankaŭ la Konvencion, per kiu kreiĝis la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por edukado, scienco kaj kulturo, kiu tekstas: **“ĉar la militoj naskiĝas en la mensoj de la homoj, ja en la mensoj de la homoj estu starigitaj la defendoj de la paco”**.,

Agnoskante, ke paco ne estas nur neesto de konfliktoj, sed ankaŭ procezo pozitiva, energia, partopreniga, kiu faciligas dialogon kaj solvado de konfliktoj laŭ interkomprenema kaj kunlaborema spirito.

Difinante la **kulturon pri paco** kiel aron de valoroj, sintenoj, kondutoj kaj vivmanieroj, kiuj forigas perforton kaj antaŭevitas konfliktojn atakante ties radikojn per dialogo kaj interkonsentiĝo inter individuoj, grupoj kaj ŝtatoj, ... la organizaĵoj de la civila socio en la tuta mondo estas instigitaj daŭrigi kaj pliiigi siajn klopodojn kaj agadojn por antaŭenigi kulturon de paco (Rezolucio akceptita de la ĝenerala asembleo de unuiĝintaj nacioj 72/137)

Enprogramigi la internacian tagon pri paco 2020 kadre de celebrado de la 20a datreveno de la antaŭenigo de kulturo de paco kaj neperforto profite al la infanoj tutmondaj (Rezolucio UN 52/15) ŝajnas prioritato en nia nuntempa mondo konsistanta el armaj konfliktoj, ekonomiaj kaj sociaj krizoj, mondo senĉese frontanta devigajn migradojn, ekstreman malriĉecon, klimatperturbon, mondo, kiu primokas la universalajn valorojn, mondo, kiu ignoras la seksegalecon, mondo, kiu ne sukcesas legkapabligi sian tutan loĝantaron, mondo serĉanta Kunvivemon...

**La Tagordo 2030** por la popoloj, por la planedo, por la prospero, por la paco kaj per partnerecoj, difinas kadre de daŭripova evoluigo la celon 16 **“Paco, justeco kaj efika institucio”**.

Tiu ĉi celo planas ekestigi pacan socion malferman al la celoj de daŭripova evoluigo vortigitaj en la trafindaĵo (16-1), kaj nete malpliigi, ĉie en la mondo, ĉiuspecan perforton...

Plifortigi kaj disvastigi kulturon de paco per korusa kantado por esprimi la kulturan diversecon kaj ebligi kunligon de arta kaj kultura identecoj. Korusa kantado estas ĉefa arta esprimado inter aliaj kiel danco, pupteatro aŭ modlado de argilo. Korusa kantado postulas neniun kostan ilon kaj kreskigas la personan feliĉiĝon, la memestimon, la kunsentemon, la regadon de teĥniko, la konscion pri grupaparteno kaj la longdaŭran kunengaĝiĝon.

Ĝi ebligas plibonigi la kapablon koncentriĝi, memori, esprimi sin en diversaj registroj kaj lingvoj. Ĝi kontribuas igi edukadon inkluziva por ĉiuj kaj krei Kunvivemon cele al paco.

**Celoj:** Kiel jam faris grupo de NROj gvidata de Michel Thouzeau:

- en 2014, internacia evento por ĉia publiko, laŭ scenaro pri paco, interpretata per pupoj, kaj el kiu dek elektitaj filmetoj estis prezentitaj dum Internacia Pupteatra Festivalo en Charleville-Mézières,
- kaj en 2018, pentrajn kaj skulptajn artaĵojn pri la temo "Flugobjektoj kaj robotoj servante al paco" estis prezentitaj dum la celebrado de la internacia tago pri paco en Tunizo.

**Realigi en 2020 festivalon pri korusa kantado konsistantan el kreaĵoj aŭ interpretaĵoj de korusaj kantoj aŭ de himnoj al paco produktitaj de grupoj de infanoj, junuloj, plenkreskuloj aŭ pluraĝuloj el la kvin kontinentoj.**

**Tiu ĉi festivalo 2020 por la paco nasku internacian aktivadon pri kantoj por la paco,** per kiu ĉiu koruso kontaktata de niaj NROj en iliaj landaj reprezentantaroj tra la mondo, devigas sin partopreni en sia loko la celebradon de la internacia tago pri paco, partoprenante krome la festivalon por la paco.

La kontribuoj ĉiuloke produktitaj kaj antaŭe senditaj estos, post validigo, alŝutitaj al la retejo de la ligkomitato de NRO/UNESKO kaj prezentataj per video-muntaĵo dum la celebrado mem de la internacia tago pri paco, kiu okazos **la 19an de septembro 2020 en Toloso, provinco de Gipusko en Hispanio, laŭ invito de TOPIC (CIT) — membro de la Internacia Korusa Federacio kaj de Europa Cantat.**

Tiu ĉi tago, la 19a de septembro 2020, iĝos tiumaniere simbola momento por celebrado de paco. Ĉiuj aliĝintaj grupoj postulos momentan ĉesigon de ĉiaspecaj perfortoj kaj simbole celebros unuminutan tutpacan paŭzon.

Ĉiu NRO estas libera pri siaj elektoj, sia kreaĵo aŭ sia interpretaĵo, kondiĉe, ke ĝi respektos la valorojn ĉi-supre vortigitajn kaj la rajtojn (vidu aliĝilon).

- **krei** tekston kaj muzikon aŭ **interpreti** triminutan korusan kanton pri paco eltiritan el loka aŭ internacia repertuaro en la elektita lingvo kaj ĝin videoregistri.
- **adresi la filmeton**, kun ĉiaspeca korpa aŭ arta esprimo: *vidu aliĝilon al la festivalo por la paco*.
- **sendi la tekston de la kanto**, tradukitan laŭplaĉe en la francan, la anglan, la hispanan aŭ Esperanton aŭ alian lingvon, al la respondeculo pri la projekto por validigo kaj subtekstado de la filmeto: *vidu aliĝilon al la festivalo por la paco*.
- **sin devigi interpreti en sia loko tiun ĉi kanton kaj unuminutan paŭzon por la paco, dum la celebrado de la internacia tago (oficiale la 21an de septembro), kadre de loka solenado de la tago pri paco kaj neperforto**.
- antaŭvidi sendi, post la celebrado, al la respondeculo pri la projekto, skriban aŭ bildan ateston de sia loka evento.
- **antologio de kantoj** estos kompilita kaj disponebla en la retejo tiucele kreota kaj dum la festivalo.

**Podia diskuto temanta pri "La artoj en la kulturo pri paco" enestis tiun Festivalon por la paco. Ĝi kunigis altnivelan debatantaron el fakuloj kaj reprezentantoj de NROj por diskutoj kun la publiko.**

**Antaŭviditaj rimedoj:**

La reprezentantoj de UNIMA proponis, ke la akcepton de la partoprenantoj en la podia diskuto kaj de la organizantoj (loĝado kaj manĝoj) kaj de la korusoj el la kvin kontinentoj financu en Toloso, en Hispanio, **la provinco de Gipusko, la urbestrejo de Toloso kaj TOPIC (CIT - Internacia Centro de Iniciatoj)**.

Estas kontaktoj kun la provincestrejo kaj la urbestrejo por la disponigo de la salonoj de TOPIC (kunvenejo kaj scenejo kun teĥnika teamo, urbaj ekranoj, teatro).

TOPIC kontribuos finance kaj antaŭ la evento en perado de tiu ĉi Tago ĉe sia koruso (alvoko al partopreno de altnivelaj korusoj reprezentantaj la kvin kontinentojn, komunikado) kaj ĉe siaj publikoj por realigi pupteatran laborejon, korusajn koncertojn en malsanulejoj kaj maljunulejoj, paŝadon por la paco, koncerton...

La provinco Gipusko sin devigas financi la vojaĝon kaj restadon de la gvidanta komitato, de la reprezentantoj de la ligkomitato de NRO, partneraj de UNESKO kaj de la kontribuantoj en la podia diskuto, la restadon de la internaciaj korusoj, la surlokan veturadon kaj la komunikilojn. TOPIC sin devigas diskonigi kaj disvastigi tiun ĉi projekton.

La grupo de la NROj oficiale partneraj de UNESKO sin devigas lanĉi, sekvi la lokajn sindevigojn pri la celebrado per korusa kantado de la tago pri paco, kunmeti kaj munti filmon prezentantan la tuton de la kantadoj, organizi la altnivelan podian diskuton partnere kun la ligkomitato kaj la sektoro SHS [sociaj kaj homaj sciencoj] de UNESKO, kaj **disvastigi tiun festivalon por la paco kaj neperforto**.

**Tiu ĉi evento, kiu okazos sabaton, la 19an de septembro 2020, estos popola pluraĝulara kaj vivoplena evento servante al Paco.**



## Celebrado de la INTERNACIA TAGO PRI PACO 2020

Laŭ propono de grupo da NROj oficiale partneraj de UNESKO.

### Festivalo por la paco

Toloso – Hispanio — sabaton, la 19-an de septembro 2020

### Aliĝilo al la festivalo por la paco.

resendenda antaŭ la **31a de januaro 2020**

al Michel Thouzeau, [michel.thouzeau@gmail.com](mailto:michel.thouzeau@gmail.com)

Familia kaj persona nomoj de la respondeculo pri la projekto: .....

Nomo de la koncerna NRO aŭ asocio: .....

Lando:.....

Retadreso de la respondeculo.....

Telefonnumero, kun la landa antaŭnumero:.....

Priskribo de la loka projekto:.....  
.....  
.....  
.....

Partoprenigas korusan grupon nomatan: .....

Konsistantan el infanoj, junuloj, plenkreskuloj, pluraĝuloj? (*substreku*)

en la projekto "Festivalo por la paco" per jena kreado aŭ interpretado:

- kreado de triminuta korusa kanto por la paco :

paroloj / paroloj kaj muziko

titolo .....

- interpretado de triminuta kanto aŭ himno al paco:

titolo .....

\* - *La respondeculo certiĝis antaŭe, ke ĝi estas senpage aŭtorrajtigita aŭ jam publike rajtigita. Okaze de ankoraŭ ne eldonita verko, la aŭtoroj (de teksto kaj de muziko) devigas sin ne subskribi iun ajn eldonkontrakton kaj donaci siajn rajtojn por ĉiu uzado de tiu ĉi verko rilate al la evento. Kadre de tiu ĉi evento, la kantantoj postulos neniun pagon por publikaj prezentoj, nek por ĉiurimeda registrado nek por disaŭdigo per iu ajn komunikilo (radio, televido, interreto, ktp.).*

- teksto kantata en ..... kaj tradukita laŭplaĉe en la angla, la franca, la hispana, Esperanto aŭ alia lingvo

- la grupo realigos filmeton de la kantado enhavantan aŭ ne ĉiuspecan korpan aŭ artan esprimadon.

-La filmeto kaj la traduko de la teksto estu nepre senditaj al:

Michel THOUZEAU michel.thouzeau@gmail.com

kaj al Claude YVANS yvans@claudeyvans.com

\* Mi devigas min, en la tago de la celebrado, sabaton la 19an de septembro 2020, prezenti en mia loko tiun ĉi korusan kanton kaj unuminutan silentan paŭzon por la paco kadre de solenado de la internacia tago pri paco (oficiale la 21an de septembro), kaj konservi skriban aŭ bildan ateston pri tio ĉi.

\* Mi rajtigas la organizantojn senpage uzi, kadre de tiu ĉi evento, ĉiujn filmojn kaj bildojn, kies aŭtoro estos mi.

Mi subskribinto, Sro S-ino .....

leginte la aldonitan informilon, devigas min partopreni en la sukcesigo de tiu ĉi festivalo obeante la ĉi-suprajn indikojn.

dato:

subskribo:

P.S.: mesaĝo de Claude YVANS: Vi ofte pridemandas, kiom bonkvalita devos esti la filmeto. Uzu vian telefonon kiel filmilon kun se eblos starigilo / koncerne la formaton, plej bona estas la mpeg 4 uzata en la reto, sed ni povos prilabori ĉion: AVI, MOV, aŭ aliajn formatojn. Tiuj, kiuj ne povos sendi la filmeton per Wetransfer aŭ similaj retaj sendiloj – povos sendi USB-memorbastoneton al:

**Claude Yvans,**

**40 rue Jeanne d'Arc,**

**51230 Fere Champenoise, Francio**

Ni povos resendi ĝin al vi se vi deziras / se eblos? Se vi disponos personon kapablan munti, ne hezitu aldoni desegnojn aŭ Pacajn mesaĝojn interne, post aŭ antaŭ via kanto: tio ĉi ne estas deviga / ĉiuj filmetoj viaj aperos kompletaj en la retejo de la projekto / sed nur ekstrakto enestos la komuna(j)n filmo(j)n prezentota(j)n en la Tago pri Paco mem aŭ en postaj eventoj.